



KONVERSACIA

LITERATURO

2

LA LITERATURON SKRIBAS
LA PERSONOJ EN LA KONVERSACIO.

Esper. 485 I



Ĉiu rajto rezervita.
Internacia Cseh - Instituto de Esperanto.

Sinjorinoj kaj sinjoroj, mi salutas vin!



Ĉu vi scias, kiu estas mi?

Jes, vi scias! Mi dankas!


Mi estas la granda homo en Ameriko.

Sinjorinoj kaj sinjoroj, mi deziras bonan vesperon!

Ĉu vi estas sanaj kaj feliĉaj?

Ĉu vi estas optimistoj?

Mi gratulas!



La grava kaj bona nokta meblo,
la lito.

En la lito la homoj kuŝas, dor-
mas kaj rigardas la belajn
fantaziajn bildojn.


La malsanaj homoj kuŝas en la lito, sed ili ne estas
feliĉaj en la lito.

Sinjorinoj kaj sinjoroj, ĉu vi kuŝas kaj dormas en la
tago?

Ĉu vi estas feliĉaj en la lito?

Mi komprenas: vi estas sanaj.

Mi gratulas!



Li iras
al la domo

Li iras
de la domo

KIE?

sur la skatolo
sub la skatolo
en la skatolo

DE KIE?

de sur la skatolo
de sub la skatolo
(de en) la skatolo
el

AL KIE?

al sur la skatolo
al sub la skatolo
al en la skatolo

KIEN?

sur la skatolon
sub la skatolon
en la skatolon

al = n

Kia mondparto estas Afriko?

De f-ino E.P.

I.



Roberto estas malgranda knabo en Eŭropo. En la mateno li iras en la lernejon. La lernejo estas granda, pura kaj moderna domo. En la lernejo lernas knaboj kaj knabinoj. La instruistino estas tre alta kaj tre maldika fraŭlino. Ŝi instruas lingvojn, gramatikon, matematikon kaj geografion. En unu tago la fraŭlino staras ĉe la geografia karto (= bildo de landoj) kaj montras sur ĝi la mondpartojn, landojn kaj urbojn. La bonaj lernantoj atentas. Sed kion faras Roberto? Li tre ŝatas la ĉokoladon (la geografion li ne ŝatas). De sub la benko li prenas ĉokoladon kaj li havas tre grandan apetiton.



— Roberto, kie estas Stokholmo? demandas la fraŭlino.

— Mmm, respondas la malfeliĉa Roberto (li havas en la buŝo grandan ĉokoladon).

— Kion signifas „mmm“?, mi ne komprenas, — demandas la instruistino.

Kaj la lernantoj faras: frr, frr.

— En Afriko, respondas Roberto.

— Ĉu en Afriko? Roberto, ĉu vi ne scias, kia mondparto estas Afriko?

Roberto silentas, li ne scias.

La instruistino estas malfeliĉa, ŝi parolas al Roberto fortajn malbelajn vortojn. En la fantazio ŝi prenas la

longan pedagogian meblon kaj batas la knabon, sed nur en fantazio. Si estas moderna instruistino.

II.

El la lernejo Roberto iras hejmen. Li estas granda pesimisto. „La mondo kun maldikaj instruistinoj kaj geografiaj kartoj estas tre malbela kaj malbona”, li parolas. Kaj li metas la malgrandan geografian karton sub la lito.

En la nokto Roberto kuŝas en la lito kaj dormas. Sed ĉu li dormas? Kaj ĉu li estas en la lito? Ne, li ne estas en la lito, sed li iras sur la geografia karto sub la lito. Li estas tre malgranda, sed la karto estas granda. Roberto iras kaj iras. Li estas en unu lando. La lando estas tre varma kaj la infanoj estas tre nigraj.



— „Bonan tagon!” salutas Roberto. „Kie estas mi?”

— „Bonan tagon!” respondas la infanoj, „vi estas en Afriko”.

Roberto faras grandajn okulojn kaj demandas:

— Ĉu vi estas ĉokoladaj homoj?

— Ĉokoladaj? Kio estas ĉokolado?

— Ĉokolado estas bruna kaj dolĉa kaj bona objekto, respondas Roberto.

Sed la nigraj infanoj ne komprenas, kio estas ĉokolado.

— Vi estas malinteligentaj, sed mi scias, kio estas ĉokolado kaj mi tre ŝatas ĝin.

— Sed ni ŝatas dikajn blankajn knabojn, parolas la nigraj infanoj, sed vi estas tre malpura.

Kaj ili metas lin en la akvon.

Ho ve!, la akvo estas nigra kaj la malfeliĉa Roberto estas tre, tre nigra. Kaj kio estas ĝi? Tre longa, sed tre maldika krokodilo tenas en la manoj longan pedagogian meblon. Roberto rigardas: ĝi ne estas krokodilo, sed la instruistino. Ŝi batas Robertson kaj demandas: „Kia mondparto estas Afriko? Ĉu vi scias?”

Roberto faras skandalon: Aj aj, mi scias, mi scias, Afriko estas tre nigra mondparto.

Kaj li kuŝas en la lito.

Estas mateno.



La **forno** estas grava objekto. En la malvarmaj tagoj ĝi faras la ĉambron varma.

En la forno estas la **fajro**. Ĝi estas ruĝa kaj varma.

Sinjorinoj kaj sinjoroj, ĉu vi havas fornojn? Ĉu vi havas fajron en la fornoj? Ĉu vi havas fajron en la okuloj kaj en la koro???

Mi faras kontrolon!



La **elefanto** estas granda, dika kaj forta besto en Afriko.

Ĝi havas kvar dikajn piedojn, du grandajn orelojn kaj unu tre longan nazon. La homoj laboras per la manoj, sed la elefanto laboras per la nazo.



La elefanto estas tre inteligenta besto, ĝi komprenas la matematikon. Sed nur la simplan matematikon: $1 = 1$.



La monologo de la pesimista porko.

Sinjorinoj kaj sinjoroj, mi ne demandas, kiu kaj kio estas mi. Vi scias.

Jes, mi estas nur porko, malgrava, sed inteligenta kaj bona besto.

Vi, homoj, rigardas min kaj fermas la nazon. Ĉu mi estas malpura besto? Ne! Mi protestas! Mi estas bona kaj pura. Sed vi, homoj, ne estas bonaj kaj ne estas puraj.

Kion faras vi? Mi respondas: Vi tenas min en malgranda malpura domo, vi metas al mi en la buŝon malpurajn objektojn. Kaj mi, la malfeliĉa malforta besto, manĝas ilin.

Per la malpuraj manĝobjektoj vi faras min dika kaj en unu bela tago vi faras la grandan skandalon. La bildo montras ĝin.

La malbona homo metas en min la maldikan objekton kaj prenas el mi la ruĝan akvon.




Vi ne metas min en la teron, sed vi metas min sur la tablon kaj de sur la tablo en la buŝon. Kaj vi manĝas min, la „malpuran beston”. Mi ne komprenas vin.

Ĉu vi estas puraj homoj? Ne! Vi estas kanibaloj! Vi havas malpurajn manojn kaj malpurajn korojn.

Homoj, mi ne amas vin, sed mi malamas vin.





Kudromaŝino

La bildoj montras du maŝinojn. Per la skribmaŝino la sinjoroj skribas kaj per la kudromaŝino la sinjorinoj kudras. Sed en la moderna mondo la



Skribmaŝino

sinjorinoj laboras kaj ili prenas de la sinjoroj la maŝinojn. La sinjoroj ne laboras, sed iras en la stratoj kun la manoj en la poŝoj. Sed en la poŝo ne estas mono. La malsana mondo staras sur la kapo . . . kaj la malsana mondo ne havas doktoron.

Sinjorinoj kaj sinjoroj, ĉu vi estas optimistoj?

(Unu maljuna sinjoro el la malnova mondo)



Laboristo

Petro estas laboristo en granda fabriko. Li havas fortajn manojn kaj kuraĝan koron. En la tago li laboras en la fabriko kaj en la nokto li dormas hejme en la lito.



Fabriko

La fabriko estas alta domo kun nigraj muroj kaj malpuraj fenestroj. En ĝi estas multaj interesaj maŝinoj. La maŝinoj laboras, ili faras multajn objektojn. Petro rigardas la maŝinojn kaj pensas: „Ankaŭ ni, homoj, estas maŝinoj”.



La pesimisto parolas:

(De lernanto N. M.)

„La mondo estas malbela kaj malbona . . .
La homoj amas nur la monon. Kaj ili estas
malsanaj en la kapo. La riĉa homo prenas
la monon el la poŝo de la malriĉa homo. La
fraŭlinoj ne estas belaj kaj fidelaj. La stratoj estas
malpuraj. La diplomatoj faras malbonan politikon. En
la kapoj de la homoj estas akvo. La instruistoj batas
la bonajn lernantojn. La homoj estas malpuraj bestoj.
La mondo havas nigran koloron. Mi estas malsana. Mi
estas malfeliĉa. Mi iras el la mondo . . .

Kie estas la revolvero?”



— Kion faras la sinjoroj?

— La sinjoroj kantas.

— Ĉu ili estas malsanaj en
la kapo?

— Ne, ne! Ili staras sub la
fenestro de bela sinjorino.
Ĉu vi komprenas?

— Jes, mi komprenas: ili estas tre malsanaj en la
kapo.

— Ĉu la sinjorinoj ne ŝatas la belan kanton?

— Jes, ili ŝatas la belan kanton, sed ili ne ŝatas la
katomuzikon.



La optimisto parolas:

(De lernanto N. M.)



„La mondo estas bela kaj bona!!!
La homoj estas interesaj, mi amas ilin!
La biero, vino kaj brando estas bonaj,
mi trinkas ilin! La floroj estas belaj,
mi tuŝas ilin per la nazo! La cigaroj estas bonaj, mi metas
ilin en la buŝon! La muziko estas bela, mi malfermas
la orelojn! La sinjorinoj estas dolĉaj, mi tuŝas ilin per la
buŝo!

La mondo estas bela, ĝi havas rozan koloron, mi amas
la mondon!!! Mi kantas kaj mi estas feliĉa!



Sur la kapo de la sinjoro estas
bela, eleganta ĉapelo. Sed li ne
prenas la ĉapelon de sur la kapo.
Ĉu li estas tre granda sinjoro? Ne,
ne! Sed li ne havas harojn sur la
kapo.

Sinjorinoj, ĉu vi ŝatas la belajn
novajn ĉapelojn?

Ĉu vi ŝatas la modernajn ele-
gantajn vestojn?

NIK NEK KAJ KAT JEN

(Malgranda romano)

II.



La homoj dormas en la nokto, sed fraŭlino Kat Jen ne dormas. Ŝi kuŝas en la lito, fermas la belajn blujajn fenestrojn de la kapo kaj faras fantaziajn bildojn.

Interesaj bildoj estas ili. Du homoj — li kaj ŝi — faras longan konversacion en la silenta ĉambro. Ili parolas novan lingvon, modernan mondlingvon. La vortoj kaj frazoj estas bela muziko. Ŝi komprenas ilin kaj ŝi estas feliĉa. En la lernejo la **juna instruisto** demandas kaj ŝi respondas, sed en la fantaziaj bildoj ŝi demandas kaj li respondas. Interesa konversacio. Ŝi faras ĝin en la koro. Jes, jes! Kat Jen estas moderna knabino, sed la knabina koro ne ŝatas la modernan muzikon. Ĝi ŝatas la malnovan dolĉan muzikon: la amajn fantaziajn bildojn. La koro parolas, la bela juna kapo faras romanon.

— Mi salutas vin, sinjoro!

— Bonan tagon, fraŭlino Kat Jen!

La frazoj montras: ŝi estas inteligenta bona knabino. Ŝi scias la etiketon. En la fantazio la nokto estas tago. Ŝi prenas seĝon kaj montras ĝin.

— Sinjoro, vi estas hejme. La seĝon mi metas al la tablo. Ĉu vi deziras teon?

— Mi dankas, fraŭlino. Mi ŝatas varman nigran kafon kun lakto.

— Jes, sinjoro! Ĉu vi deziras cigaron?

— Ne, fraŭlino! Mi ŝatas malfortajn cigaredojn.



— Ho, mi estas malfeliĉa! Mi ne havas cigaredojn, mi ne havas cigarojn. Mi havas bonan dolĉan ĉokoladon. Dolĉan sekreton en bela skatolo. Ĉu vi havas apetiton? Sinjoro, mi parolas, parolas, sed vi ne aŭskultas min. Vi estas malbona homo.

En la fantazia bildo Nik Nek iras al la fenestro. Li rigardas la straton. Kion signifas la silento? Li havas pesimistan filozofion en la kapo. Ŝi komprenas kaj faras novan konversacion.

— Sinjoro, ĉu vi ŝatas la modernan muzikon?

— Mi ne ŝatas ĝin. En la moderna muziko ne estas kora varmo.

— Ĉu vi ŝatas la kora varmon... **en la muziko?**

— Jes, fraŭlino! En la muziko kaj en la... **parolo.** La kora varmo, la kora varmo, fraŭlino, la ko-ra var-mo... Malfacila frazo! Ĝi ne estas Esperanta gramatiko. La Esperanta gramatiko estas simpla, sed la kora varmo kun la muziko estas longa frazo. Kaj... kaj... vi ne komprenas la longajn frazojn, fraŭlino.

Nik Nek staras ĉe la fenestro. Kat Jen iras de la tablo al la fenestro kaj ŝi rigardas la straton. Ŝi havas optimistan filozofion en la koro. Ĝi parolas mallongan frazon. Mallongan, sed dolĉan, gravan kaj interesan.



— Ĉu vi estas malfeliĉa, sinjoro Nik Nek?

En la bela fantazio la juna instruisto prenas ŝiajn manojn kaj rigardas ŝin. Li rigardas, rigardas, sed ne parolas.

— Vi silentas, sinjoro. Ĉu vi ne ŝatas la konversacion?

— Sed jes, fraŭlino. La muziko de la koro parolas en ĝi.

Longa silento. La manoj tenas la manojn. Nik Nek kaj Kat Jen ne rigardas la straton. La fantazia instruisto parolas kaj parolas, sed ne en la nova lingvo. Li parolas en la hejma lingvo de Kat Jen kaj ŝi komprenas la belajn longajn frazojn, la interesajn demandojn, sed ŝi ne respondas. La respondon ŝi fermas en la koron. Ho, ĝi batas forte, forte! Ĝi faras malmodernan muzikon kaj ŝi aŭskultas la dolĉan melodion. Dolĉa melodio kun kora varmo. La juna knabino estas feliĉa kaj dormas, dormas en la silenta nokto.

* * *



La homoj dormas en la nokto, sinjoro Nik Nek maldormas. Sur la lito kuŝas libroj, paperoj kaj skatoloj kun cigaredoj. Sur la muro parolas grava objekto. Ĝi faras mallongajn, egalajn frazojn: tiki tak . . . tiki tak . . . Sur la tablo staras lampo kaj telefona aparato.

La juna instruisto sidas ĉe la tablo. Li laboras. Sur la tablo estas paperoj kun demandaj frazoj, kaj kun mallongaj respondoj. Nigraj frazoj. Li metas ruĝajn literojn en la frazojn. La kraĵo laboras en la mano. La kapo deziras dormon.

Nik Nek prenas novan paperon el la paperoj.

„Kiu estas vi?” „Mi estas fraŭlino Kat Jen”.

„Kio estas vi?” „Mi estas malgranda oficistino”.

... ..
„Ĉu vi ŝatas la malvarman teon?” „Mi ŝatas vin!”

La ruĝa kraĵono skribas: **La demando estas, ĉu vi ŝatas la teon? Ĉu vi komprenas, fraŭlino? La teon kaj ne min. Mi ne estas teo.**

„**Kiu amas vin?**” „**Vi ne amas min**”.

La ruĝa kraĵono forte laboras: **La demando ne estas: ĉu mi amas vin? Ho, vi, moderna malgranda oficistino, mi ne amas vin. Mi ne scias, kiu estas vi. Ĉu mi ne scias? Jes! Ŝi estas Kat Jen! Kat Jen, Kat Jen! Kiu estas Kat Jen? . . . Mi ne scias.**

„**Kiun amas vi?**” „**? ? ?**” „**Dolĉa sekreto, sed ne en la skatolo!**”

— Kia respondo! La malgranda oficistino estas infano, granda infano. Sed kiu, kiu estas ŝi? Mi scias, ŝi estas Kat Jen, sed mi ne scias, kiu estas Kat Jen el la fraŭlinoj.

„**Ĉu vi estas feliĉa?**” „**Mi estas malmalfeliĉa!**”

La ruĝa kraĵono faras dikan laboron sur la vortoj „**malmal**” kaj skribas: „**Malmalmalfeliĉa ne estas Esperanta vorto! Esperanta vorto estas: malfeliĉa. Kaj vi ne estas malfeliĉa**”.

Nik Nek metas la kraĵonon sur la tablon kaj forte rigardas al la lampo.

— Pesimista filozofio. Jes, Kat Jen havas pesimistan filozofion. Ŝi estas juna, sana kaj **malfeliĉa**. Ho, moderna mondo, en vi la junaj knabinoj estas malfeliĉaj. Sed ĉu mi estas feliĉa? Mi, Nik Nek, la juna, sana homo. Mi ne estas feliĉa. De urbo al urbo mi iras. Mi ne havas hejmon. Kiu amas min? Kiun amas mi? Mi amas la homojn, la homojn, sed . . . Ho, la homoj estas bonaj, sed . . .




KUL

Esperanto

485 1

E-11720



D
ob
ta
ĝi
grava objekto demandas. Eĥi tnik
Nek respondas la koro: tik... tak...
tik... tak...

— Kiu estas Kat Jen?... Mi ne scias... Dolĉa sekreto, sed ne en la skatolo... Dolĉa infano, pesimista malgranda oficistino... Kat Jen... Ŝi estas malfeliĉa... Kiu?... Kiu?... Ĉu ŝi estas la bela oficistino... la rozoruĝa laktoblanka fraŭlino?... Ho!... Jes, jes! Ŝi estas, mi scias, ŝi estas... ŝi, la bela, la dolĉa, la malgranda...

Kaj Nik Nek havas junan varmon en la koro. La fantazio montras belajn bildojn kaj en la nokta silento parolas la gravaj objektoj.

— Tiki tak?... Tiki tak?... — la demando.

— Tak! Tak! Tak! Tak! Tak! Tak!... — respondas forte la koro kun malmoderna, sed kun feliĉa melodio.

